

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN

{ Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1995 — 2

(APRIL-MAJ-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Jean de La Fontaine



... Kaj Esperanto kaj Filmo

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo	2
Jean de la Fontaine	3
Kalocsay, la gramatikisto (Boyet)	4-5
Esperanto kaj kino (J. Forge)	6-8
La Kudrilo (Karel Čapek)	9
La kvinpinta stelo de Islamo	10-11
Mezepoka Esperanto (Kopar)	12-13
Por via Distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL 'GRESILLON

En la mezjara numero de Kulturaj Kajeroj kutime aperas raporto pri la Printempa Infanrenkonto. Ĉijare ni devas pluraligi la titolon kaj skribi pri Printempaj Infanrenkontoj. Kial du sinsekvaj similaj staĝoj? Ĉar la kalendaro de la lernejaj printempaj ferioj ne permesas organizi tiun renkonton dum ferisemajno komuna je ĉiuj lernantoj de Francio. kaj je ĉiuj eblaj animantoj, kiuj plej ofte estas geinstruistoj. Pro tio dum unu semajno disvolviĝis la kutima renkonto, kaj dum la sekvanta okazis nova formo de renkonto t.e. ke Grezijono tiam estis nur akceptoloko por grupo de kvindekda de geknaboj el Francio kaj eksterlandoj. La organizantoj estis ges-roj Noël el Outreau.

Ambaŭ renkontoj sukcesis kaj plaĉis al la partoprenantoj. La aktivaĵoj estis diversaj: kursoj, art-laboroj, promenadoj, redaktado de gazeto,... Multe plaĉis ankaŭ al la geknaboj el aliaj landoj tiuj ren-

kontoj.

Oni kelkfoje faras al ni demandojn pri la financa profito de tiuj printempaj staĝoj. Ni devas konfesi, ke ĝi estas eta, eĉ proksimas la nulo. La ĉiutagaj elspezoj estas, por geknaboj, pli malpli la samaj, kiel por plen-kreskuloj, kvankam la restad-tarifo estas multe pli malalta. Plie la Esperanto-Domo gastigas senpage kelkajn partoprenantojn. Se ne venus la donacoj de malavaraj geamikoj, la malprofito estus neeltenebla... kaj tiuj renkontoj ne plu ekzistis. Sed la profito estas espereble por la partoprenantaj geknaboj, kaj tio pravigas la organizan laboron, kiu estas granda. Ĉu ne Paulette? Ĉu ne Monique?

NI FUNEBRAS

En majo ni estis informitaj pri la forpaso de J.A. Rousseau. Li estis konata de la nacia kaj eĉ de la monda movado. Ĉar, dum kvindekda jaroj li zorgis pri la financoj de la Franca Unuiĝo kaj dum jaroj li ne nur partoprenis Internaciajn Kongresojn sed ankaŭ organizis komunajn vojaĝojn tien. Sed por la respondesculoj de Gresillon li estis, ĉefe, amiko, kiu, jam de longe, ĉiujare ĉeestis la somerajn aktivajojn de la Esperanto-Domo dum pluraj semajnoj. La venonta somero ne estos tute la sama en la kastelo.

Al liaj infanoj, al lia fratino, ni asertas, ke ni ne forgesos lin.

ESPERANTO TRA LA MONDO

50-a KONGRESO DE SAT-AMIKARO - Tiu jubilea kongreso okazis en aprilo en la alzata urbeto Mittelwhir. Krom la oficialaj kunvenoj okazis interesaj prelegoj el kiuj unu farita de L. Vulkovič pri la politika situacio en Rusio. Ed. Ludwig kaj J.P. Cancel detale prezentis TAKE. La ekskursoj vizitigis al granda parto de la kongresantoj sudan Alzacon.

LA INTERNACIA AGO-TAGO - Laŭ la sugesto de la Informa fako de UEA, la Internacia Ago-Tago por esperanto okazos ĉijare la 7-an de oktobro. Ĝi celas prezenti la ekziston kaj valoron de esperanto al kiel eble plej granda publiko, kun la amaskomunikiloj kiel natura celo. Tiun jaron estas rekomendite ligi, en la argumentaro, la 50-jariĝon de Unuiĝintaj Nacioj, substrekante, ke se UN apogas la superregadon de kelkaj "mondlingvoj", la esperanto-movado disvastigas modelon de vere justa kaj efika tutmonda komunikado, surbaze de la principoj de homaj rajtoj, toleremo kaj plena demokratio. De nun la esperanto-grupoj estas invitataj prepari tiun Ago-Tagon, kiu cetere povas esti prezentota, kiel Tago de la esperanta kulturo.

EN LA UNIVERSITATOJ - Se la eventuale koncernataj esperantaj medioj donos rapide sian apogon, tre grava projekto povas konkretiĝi: la nuna teamo de la universitato de Santiago de Compostela, en Hispanio, estas preta subteni, ankaŭ finance, ĉiujaran okazigon de senprofitaj somerkursoj en esperanto. La nivelo estus antaŭ-universitata aŭ universitat-prepara. Diverslandaj gelnantoj kolektiĝos por studi, dum unu aŭ pluraj semajnoj, aron da temoj elekteblaj. La lernantoj ricevos diplomon. Povus esti modesta komenco en 1995. Rilati kun Antonio Alonso Nunez, Curso de Esperanto, Facultade de Filoloxia ES-15705 Santiago de Compostela, Hispanio.

En la Samarkanda ŝtata universitato (Uzbekio), okazis du novaj diplomigoj pri esperantologiaj temoj. Studento Andrej Harlamov diplomiĝis pri la temo: "Kompara analizo de la sistemo de verboj kaj ĉiutaga leksiko en la angla lingvo kaj esperanto". Lia edzino sukcese

defendis la diplomverkon: "Ruslingva influo je esperanto". Jam en la sama universitato "Aliŝer Navoi", okazis kvar esperantologiaj diplomigoj kaj alia studento preparas studon pri la "germana kaj esperanta frazeologio".

-En Mongolio, okazis esperanto-kurso en la universitato de Mongolaj scioj, en Ulanbatoro kaj tie fondiĝis esperanta klubo.

-En Madagaskaro startis kurso en la beletra fakultato de universitato de Antananarivo. Same en la komerca kaj teknika altlernejo EPCT.

-Oni anoncas kursojn de esperanto en la universitato California de San Diego (Usono) kaj en la universitato Waseda (Japanio).

-Momente malpermesitaj, la esperanto-kursoj de la hungara universitato de Debrecsen, estis restarigitaj dank'al energiaj protestoj.

POR NIAJ BIBLIOTEKOJ - Oni eble ne sufiĉe informadis pri la kvara eldono, en la eldonejo "Progreso" de Moskvo, de la "Historio de la mondlingvo" de Ernest Karlovič Drezen, eminenta gvidinto de la soveta esperanto-movado, ekzekutita la 27-an de oktobro 1937, viktimo de la stalina terorismo. Tiu libro 456-paĝa priskribas praktike ĉiujn provojn de universalaj, internaciaj lingvoj tra la jarcentoj. Ĝi estis reeldonita kun studo de S.N. Kuznecov pri Drezen, lia verko, kaj lia epoko.

ĈE LA GERMANAJ LINGVISTOJ - La lasta konferenco de la Germana Societo pri Lingvistiko entenis laborgrupon pri la "planlingvoj". Trideko da esperantistaj lingvistoj el ses landoj partoprenis la diskutojn sine de la laborgrupo. Oni klopodas por eldoni la prelegojn en prestiĝa serio lingvistika.

TURISMO - Ekzistas nun ebleco, pere de esperanto, vojaĝi al la historiaj kaj sanktaj lokoj en Israelo, dank'al kunlaboro inter "Centro Sivon" kaj la vojaĝagentejo "Universal". Oni promesas al la grupoj de turistoj, gvidadon en agrabia esperanta etoso. Rilati kun Jeremi Gishron, Centro Sivron, Box 2 31 80, IL-91 231 Jerusalem.

-Malyta Turisma Semajno, 3-9-a de septembro. Inf. Malta Esperanto-Asocio, pk 142, Valetta, CMR 01 Malta.

LA FONTAINE

KAJ LA BESTOJ

Antaŭ tricent jaroj mortis la franca fablisto Jean de la Fontaine, post vivo iom parazita, kiel tiu de la plimulto el la tiamaj verkistoj kaj artistoj. Li vivis, kiel provinca burĝo, ŝatanto de la Pariza mondumo, serĉanto de flata konataro. Li longtempe vivis meze de grandega parko, en la kastelo de Vaux, kies proprietulo, la superintendanto Fouquet, donis al li pension. Post la arestado de Fouquet, La Fontaine, longtempe konsternigita kaj senkonsila, revenas al Parizo, kaj tiam komenciĝas lia literatura periodo.

Kiel La Fontaine tiel bone konis la bestojn? La franca verkisto Jean Giraudoux trafe studis tiun flankon de la arto de la fablisto. La suba artikolo plej grandparte ŝuldas al la libro de J. Giraudoux.

Ekzistas du teorioj rilate la bestojn de La Fontaine. Oni eĉ povas akcepti trian. Unuj mireĝas pri la vereco de tiuj bestoj, kaj opinias, ke La Fontaine konis la alaŭdojn ĉar lia naskiĝregiono, Ĉampanio, estis plena je tiuj birdoj; ankaŭ multaj vulpoj vivis tie kaj multajn hundojn li havis. Ĉar dum dudek jaroj li estis "Mastro de la akvoj kaj arbaroj", dum siaj promonadoj li havis jam la okazon "kunlabori" kun la estontaj roluloj, kaj li povis, en unu tago, vidi la ĉirkaŭaĵon kaj la aktorojn de siaj dekdu fablolibroj. Aliaj pretendas, ke la bestoj de La Fontaine estas nur teoriaĵoj, kiel tiuj de Ezopo kaj Floriano. Estiĝis kvereloj pri la bestoj de La Fontaine, kiel pri la bestoj de Descartes, kaj la zoologoj kaj entomologoj provis montri, ke ambaŭ aŭtoroj sciis nenion pri la bestaro. La cikado ne povas viziti la formikon, kiam blovis "la vintra vento" ĉar tiam dormas la formikaro kaj mortis la cikadaro. Kaj ĉi lastaj "ne povintus manĝi muŝojn, vermetojn aŭ grajnoj, ĉar ili simple posedas suĉilon por elsuĉi la sukon de la arboj".

Sed tiuj du teorioj ne pravigas la plezuron, kiun ni spertas, kiam ni legas fablon. Estas iu instruistino, kiu okaze de oftaj vizitoj en zoologia parko, legas por siaj lernantoj fablojn starante antaŭ

enkaĝaj bestoj koncernataj. Tio konsistigas valoran kritik-manieron. Se vi mem legus, antaŭ katoj, unu el la multaj fabloj pri aŭ kun katoj, vi estus surprizita de la fakto, ke, male de la unua teorio, la bestoj de La Fontaine diras nur parolojn tute ne bestecajn, sed ankaŭ ke, male de la dua teorio, la gestoj, sintenoj de tiuj bestoj estas tiel ĝustaj, ke neniuj besto-deseĝnistoj vere sukcesis ilin prezenti. Ŝajnas do, ke la vero estas jena: La Fontaine ne montras al ni homojn maskitajn kiel bestojn, sed la kontraŭon. Sub la homa masko, ne tute konscia je kio la fablisto dirigas al ĝi, vivas vera besto. Sub tiu avareco, tiu flatego trudita al ili, ekzistas felisaro falva, ungeghava, harkovrita, kaj iom post iom vidiĝas, tra la homa maskovesto, la simplanimeco, la maltrankvilo de la besto. Tio ne trovas ĝustigon nur en la fablo-tekniko, sed ankaŭ en la amo al bestoj, en familiareco kun bestoj. Sed kie La Fontaine renkontis ilin?

Ĉu en la kamparo, kiam li estis "Mastro de la akvoj kaj arbaroj"? Ĉu dum la jaroj, kiam li estis kortegano de Fouquet, en la kastelo de Vaux? En la vastaj ĝardenoj de tiu kastelo, la unuan fojon La Fontaine kaj la bestoj interkonatiĝis. Se ni legas la poemon "La Sonĝo de Vaux", celantan la ilustradon de la homo meze de lukso, ni konstatas, ke nur tri epizodoj estas kompletaj: la aventuro de sciuro, la renkonto kun mortanta cigno kaj la historio de salmo kaj sturgo. Transvivis la pompon de Fouquet nur kvar bestoj.

"Ĉar mi ŝatas harmonion, mi forlasis la lokon, kie mi estis kaj aliris al tiu, kie aŭdiĝis la sono... Lycidas diris al mi, ke iu cigno de Vaux estis baldaŭ mortonta, kaj Lambert, la fama muzikisto estis venigata: oni komparis lian kanton kun tiu de la cigno... Oni kredis, ke la cigno ne kuraĝos kanti post li (Lambert). Tamen, ĝi kantis bele; sed en ne komprenebla lingvo."

La rendezuo kun la bestoj okazis. Kaj kiam La Fontaine havis la ideon provi imiti Ezopon, kiu tiam fariĝis laŭmoda, li estis agrable surprizita, kiam, de la komenco, li retrovis la bestojn de la parko de la kastelo de Vaux jam vivantaj en la latina kaj la greka literaturoj. Li konstatas ankaŭ, ke li sentas sin komforta kun ili. Nekonscia familiareco malkaŝiĝas. La malgranda bestaro de Ezopo ne sufiĉas al li. Venas al li, ne la teoriaj bestoj de la fablistoj, sed

KALOCSAY

LA GRAMATIKISTO

(fino)

Se oni lasas flanke iun ajn teorion, oni povas klarigi la diferencon per la influo de naciaj lingvoj. Kiam oni transiras de la "ata" periodo (ago komencita-nefinita) al la "ita" periodo (oni atingis la rezulton, laŭ la skemo, kiam oni transpasas la punkton "F"), la naciaj lingvoj havas diversajn kutimojn, kiujn revuas Kalocsay:

hispane: era (fue, estaba) escrito
pole:byt pisany, zostat (byt) napisany
Tiu tipo hispana-pola entenas tri formojn, kiuj respondas sur la skemo al la regionoj: antaŭ la fino, je la fino, post la fino.

angle: was being (was, was) written
ruse: pisalsja, byl (byl) napisan
tiu tipo angla-rusa entenas nur du formojn, kiuj respondas al la partoj de la skemo: antaŭ la fino, la fina momento, la daŭro post la fino.

germane: wurde (wurde, war) geschrieben
Tiu tipo germana entenas nur du formojn, kiuj respondas al la partoj de la skemo: 1) kaj antaŭ la fino kaj je la momenta fino; 2) post la fino.

Al tiu revuo de lingvisto, mi aldonos matematikan terminaron, kiu rilatas ne al la daŭro, sed al la spaco, sed ĉu oni ne antaŭe uzis skemon x.....K.....F.....y. La rektio (xy) entenas la punktojn K kaj F, kiuj dividas ĝin en tri partojn, kiuj estas la rektoduono xK, la segmento KF kaj la rektoduono Fy. Oni bone komprenu, ke "x" kaj "y" ne estas punktoj sed nur indikiloj pri la nekonataj "finoj" de nefinita rektio. Laŭdifine, la segmento KF estas la aro de la punktoj, kiuj estas inter K kaj F. Sed tiu difino ne estas sufiĉe preciza; tial la matematikistoj distingas la apertan segmenton, kie la limaj punktoj ne estas entenantaj, kaj la fermitan segmenton, kie la limaj punktoj estas entenantaj. Se oni aplikas tiun difinon al la prezenca partiko, en la regiono de F, ni diros, por Kalocsay, la daŭro estas aperta, dum, por la opozicia skolo, la "ata" daŭro estas fermata, tio signifas "entenas la limon".

Ĉu oni rajtas alvoki la "logikon"? Matematike, la punkto "F" estas komuna al la segmento KF kaj la rektoduono Fy, kaj se oni decidas meti ĝin nur en unu el tiuj du aroj, tio estas pura konvencio. Cetere laŭ la sistemo de la lingvoj hispana kaj pola ekzistas tute speciala lingvaĵo por signi tiun momenton, kiu tiam estas en neniu aro nek antaŭa nek posta.

Cetere, tiu konvencio postulas novan sistemon por distingi la finan momenton de la daŭroj, kiuj estas antaŭ aŭ post ĝi. En la sistemo de Mimo, antaŭ la fino, iu letero estas skribata, kaj precize je la fino, ĝi estas "elskribata". Sed en alia sistemo, kiu estas tiu de Kalocsay, oni kelkfoje devas distingi la finan momenton: "la letero estis skribita" de la postaj momentoj, kiam: "la letero estis jam skribita".

Tiuj lastaj rimarkoj rilatas al la praktika problemo, kiu opozicias ekde 1891 la uzantojn de "estis skribita" disde la uzantoj de "estis skribata" por signi la saman momenton, kiu estas precize tiu de la ago-fino - rezultokomenco. Eble tiu praktika uzo fontas el la sistemo de la ĝermanaj lingvoj; mi ne kompetentas por tion solvi.

Restas la teoriaj opozicioj, pri kiuj la citita libro de Kalocsay aludas en la polemiko de 1966. Laŭ mia opinio, ili eksmodiĝis, kaj ŝajnas al mi, ke dum daŭras la konflikto en la praktiko, la uzantoj de "ata" en la konjugacia formo "estis ...ata" por montri la finan momenton, preferas citi la teorion de Mimo, kies lingvo estis nomata de li "regula Esperanto" kaj por kiu la participoj havas nur tempan valoron. Laŭ tiu teorio, la simplaj tempoj de la aktivo, la kompleksaj tempoj de la aktivo, kaj tiuj de la pasivo devas esti paralelaj; ekzemple por la pasinta tempo egalvaloras: 1) mi skribis leteron, 2) mi estas skribinta leteron, 3) mi estis skribanta leteron, 4) la letero estas skribita, 5) la letero estis skribata. Sed por tiu skolo la esprimo: "la letero estis skribita" montras pluskvamperfekton (tempo kiu antaŭas la pasintan); tio signifas, ke mi skribis leteron la 10an de februaro, kaj se mi diras poste: "la 10an de februaro mi skribis leteron" la pasiva formo devas esti: "la letero estis skribata la 10an de februaro", ĉar la uzo de: "la letero estis skribita la 10an de februaro" tio signifas, ke la skribado okazis antaŭ tiu dato.

(sekvo de paĝo 3)

Tiu nura atento pri la tempo, kondukis Kalocsay al tiuj rimarkoj en la citita libro: "Laŭ Mimo ankaŭ la du frazoj: 'la domo estis konstruata' kaj 'la domo estas konstruita' estas plene samsignifaj kaj lia konsekvenco estas laŭdinda, ĉar netempisme (se oni konsideras nur la temp-on) ili estas samsignifaj." Kaj pli poste li skribas: "Antaŭe temis pri neta tempismo, kaj nocioj, kiel perfektiveco kaj imperfektiveco estis severe kondamnitaj...laŭ tiu teorio oni povus diri: 'La malsanulo jam mortis hieraŭ, sed dank'al Dio hodiaŭ li fartas iom pli bone' aŭ 'la domo estis longe konstruita (ne plu konstruata), sed baldaŭ oni rekomencos ĝian konstruadon'".

En la citita libro de Kalocsay estas ankaŭ multaj rimarkoj pri diversaj problemoj, kiuj rilatas al la konjugacio; mi ne intencas ilin klarigi ĉi tie. Mi nur citos kelkajn tiajn problemojn: pluskvamperfekto, aspektoj gradoj kaj statoj, la verbotempo en la subpropozicio....

Mi konkludas per la grava rolo de Kalocsay en la gramatikaj problemoj. Plurfoje, li tre klare montris, kiel funkcias la lingvo en la praktiko, kaj tiris el tiu praktiko iun teorion. Ni unue vidis tion pri la vortfarado, kiu nun estas agnoskita de la Akademio, kaj poste mi provis substreki la valoron de lia klarigo pri la aspekta valoro de la tiel nomata "prezenca tempo", kiu ebligas la klarigon de la pasivaj participoj en la uzo de Zamenhof kaj tiu de la plimulto el inter la akademianoj laŭ la voĉdono de 1967.

(El prelego farita de Fernand BOYET en la Esperanto-Domo Gresillon)

Jean THIERRY forlasis nin

Lastmomente venis al ni la informo, ke Jean Thierry mortis. Ne necesas prezenti la esperantiston, la verkiston, membron de FEI, sekretario de la Akademio. Ni nur diros, ke lia forpaso estas gravega perdo por Esperanto, kaj la movado.

Al Marie, Alain kaj Elise iras niaj plej malĝojaj kondolencoj.

bestoj konataj, vivantaj. Ili faras la fablojn specoj de orientdevenaj rakontoj, kiuj, en la franca literaturo, ankoraŭ restas sensimilaj. La Fontaine fariĝas posedanto de vera sennombra bestaro, kiu alpelas al li la veron. Li fiŝkaptas la veron pere de kormorano; li ĉasas ĝin pere de leono. Tiu bestoj sentas, ke La Fontaine amas ilin. Ili fariĝas la vera kialo de la fabloj. Rakontante, li pli kaj pli ŝatas ilin. Maljuniĝinta li plu observas la formikojn kaj tradukas la "enterigo de la formiko"-n de Sankta Hieronimo:

"Li vidis apud trunko multajn legiojn
De formikoj elirantaj el siaj kavernoj.
Unu puŝis ŝarĝon; aliaj pruntis dorson.
La amo al ĉiuj malpermesis ripozon.
La ĉefoj kuraĝigis ĉiujn per ekzemplo.
Iu el la popolo mortis; nia sanktulo
Rigardas ĝin zorgeme portatan
De funebrantaro,
For de la svarma komunumo."

La Fontaine klamas sian amon al la bestoj. Descartes asertis, ke la bestoj ne havas animon, S-ino de Sévigné, f-ino de Scudéry protestas. Ankaŭ la nevino de Descartes, kiu respondas al la "Parolado pri Metodo":

"Kiam plej belan silvion mi vidis
Revenantan kien vi sidis,
Ah! mi ekkriis mireganta
Juĝon ĝi havas spite al onklo mia."

Tiam, en tiu jarcento de homa spirito kaj orgojlo, de religio, preskaŭ ĉiuj adoptis tezon, kiu lasas la homaron solan sur la tero kaj en la Paradizo. La filozofo Malebranche frapadis sian hundinon pretekste, ke ĝi sentis nenium suferon, La Fontaine ne konsentas pri tiu ekskludo. Kontraŭ tio li diras rememorojn de sia junaĝo. Post la aserto de Descartes, liaj fratecaj sentoj al la bestoj, ankaŭ lia kompato kreskas. Lia plej ŝatata libro estas tiu de Pilpay, la hinda fablisto. De tiu lasta li akiras specon de panteismo. En siaj lastaj fabloj ŝajnas, ke li preterententas la moralon kaj interesiĝas nur pri la vivo-debatoj. En la hindaj rakontoj la bestoj estas babilemaj. Ili kondukas la francan fabliston al epopeo al universa kunsento, ne al nenobla, homa ĝenro.

"Tiel mia Muzo, borde de pura ondo
Tradukis en dian lingvon
Ĉion diritan sub la ĉielo
De estaĵoj uzantaj la naturan voĉon.
Pere de diversaj popoloj,
Mi igis ilin aktoroj de mia laboro:
Ĉar ĉio parolas en la universo;
Nenio estas senlingva."

ESPERANTO KAJ KINO

Redaktis: Jean Forge-Fethke

Jean Forge-Fethke estis pola verkisto, kies plej konataj verkaĵoj, "Mr Tot aĉetas mil okulojn" kaj "Abismoj", estis tradukitaj respektive en kvin kaj du naciajn lingvojn. Li estis filmreĝisoro en la fama UFA-kompanio (Universum Film A.G.) kaj verkis la esperantlingvan parolon de originale germanlingva filmo "Morgaŭ mi komencos la vivon" prezentita en la Universala Kongreso de Stokholmo (1934). Li verkis serion de artikoloj pri Esperanto kaj kino en "Literatura Mondo". La ĉi suba artikolo aperis en tiu revuo en 1931.

Kiam ni havos nian filmon?

Ni neniel esperu la helpon de la filmopotenculoj amerikaj aŭ eŭropaj; ni ne esperu, ke la grandaj firmaoj faros Esperantan varianton de siaj filmoj, sed ni komencu plej baldaŭ fosi nian sulkon sur la filma kampo! En Krakovo oni parolis iomete pri la problemo "Filmo en la servo de la Esperanta propagando", kaj hodiaŭ, kiam ekzistas la parolanta filmo, ni nepre devas komenci!

"Ni ne havas monon," estas la ofta respondo de skeptikuloj, "ni estas tro malriĉaj por fabrikii filmojn". Kompreneble ni ne povas nun produkti Esperantajn dramojn aŭ komediojn; por tio mankas kapitalo, reĝisoroj, geaktoroj. Sed ni nepre devas komenci fari ion por kaj per la filmo. Ni devas antaŭ ĉio krei la pri-Esperantan propagandan filmon! Nia unua celo estu kvincent-metra (duakta) filmo pri nia movado, pri la kongresoj, pri la historio de Esperanto. Ĝi estu iaspeca kulturfilmo, kiu informos kaj instruos la ne-esperantan publikon pri nia afero. Hodiaŭ ja ĉiu pli grava movado, ĉiu pli grava instituto, fabriko, sekto, gimnastika lernejo havas sian varban instruon filmon. Kial la esperanto-movado ne disponas pri tia filmo? La kino-teatro en via urbo certe ludos tiun filmon dum via "Esperanta Semajno."

Kiamaniere efektiviĝi la unuan Esperantan filmon? Antaŭ ĉio ni devas kolekti la jam pretan materialon, kiun ni bezonas por la muntado de la filmo, t.e. taŭgajn film-negativojn montrantajn nian Majstron, scenojn el la Esperantista vivo, eminentulojn, malkovrojn de Zamenhofaj monumentoj kaj stratoj, bildojn de la kongresoj ktp. Ni devas zorgi pri daŭra speciala filmado de la kongresoj Esperantaj. Fakuloj kaj spertaj specialistoj faru tion laŭplane. La kostojn de tiu ĉi filmado (cetere ne tro altajn!) pagu la LKK. La kostojn oni povas parte tuj reenspezi per vendado de kopioj al la filmservoj kaj aktualaj semajnoj de UFA-filmkompanio, Fox, Pathe, ktp. Tiamaniere oni faros propagandon antaŭ milionoj da homoj kaj samtempe kreas la materialon por posta speciala pri-Esperanto propagandfilmo. Kiam ni kolektis sufiĉan taŭgan materialon, ni povos ankoraŭ kompletigi ĝin per statistikaj bildoj kaj poste ni komencos la muntadon de la filmo, laŭorde donante la materialon, enmetante eĉ Esperant-lingvan dialogon. La pretan filmon oni pruntedonu al diversaj Esperantaj grupoj, al Ĉe-instruistoj kaj aliaj propagandistoj kontraŭ ioma pago kaj tiamaniere oni reenspezu la finajn kostojn. Estas tute superflue akcenti la eksterordinaran propagandan signifon de tia filmo; ĉar estas malnova fakto, ke la publiko kredas tion, kion ĝi vidas per propraj okuloj. Estas urĝa tempo, ke la Esperantistaro kaj precipe ĝiaj gvidantoj komencu okupi sin pri tiu projekto de Esperanta filmo.

Alia tre interesa projekto, kiu nepre havas ŝancojn por sukcesi, estas filmigo de prova Ĉe-leciono! Hodiaŭ kiam ni havas la parolantan filmon, ni brile povus montri al la publiko Ĉe-instruiston kun lia gaja lernantaro, kiu ĥore respondas al liaj demandoj. Spertaj fakuloj kaj reĝisoro devus turni tiun filmon. La kostoj kompreneble estus iom pli altaj, sed ne tiel altaj, ke la Ĉe-instituto ne povus pagi ĝin. Estas tute certe, ke tiu filmo trovus grandan atenton tra la tuta mondo; ĝi estus samtempe bonega antaŭpropagando por ĉiu Ĉe-kurso. La publiko en la kinoteatro ekinteresiĝus per la filmo pri Esperanto kaj pri la amuzameto. Laŭ mia opinio la produktado de 500-750 metra Ĉe-filmo estas tute senriska kaj eĉ profitdona entrepreno, se ĝi estas farita de fakuloj.

Dum la Krakova kongreso fondiĝis la "Esperanta Kooperativo de konsumantoj pri parol- kaj mutfilmoj", kies gvidanto estas s-ro Gelfand. La ideo de s-ro Gelfand estas fondi en ĉiu urbo kooperativon, kiu varbu jarajn abonantojn-konsumantojn por liverotaj Esperanto-filmoj. La jarabono ne superu po 5 dolaroj por ĉiu persono. La valoro de aparta akcio estas same 5 dolaroj. Kiam ekzistos ne malpli ol cent kooperativoj en cent urboj, la centra kooperativo mendas la unuan filmon per konkurso de tutmondaj filmo-fabrikoj. S-ro Gelfand supozas, ke estos eble doni ĉiusemajne du sesdekminutajn filmojn, kies programon li imagas instrua, tute esperantlingva.

La ideo de Esperantaj film-konsumantoj estas tre taŭga. Sed ĉu ni kolektos tiom da kapitalo por produkti filmojn por ni mem, ne estas certe. Por tio estus necesa granda propagando inter la Esperantistoj, iniciato de niaj centraj organizaĵoj, subteno de la gazetaro. Tamen, ni ne ĉesu paroli pri la graveco de la filmo en nia movado. Ni propagandas hodiaŭ Esperanton per la gazetaro, per la radio, sed pri la plej potenca kaj plej internacia voĉo de la ekrano, de la filmo, ni forgesas. Kvardek jarojn ni jam batalas por nia ideo, ni gvidas kursojn, ni verkas artikolojn, ni propagandas ĉiupaŝe, kaj tamen ni ĝis nun ne sukcesis popularigi Esperanton. Ĉar ni timas, timas aŭ tro malfortas, por fari foje ion grandiozan, ion, kio efektive turnus la atenton de la tuta mondo al nia afero.

La filmo estas tiu "io". Se ni sukcesos paŝon post paŝo adapti ĝian diablan potencon por niaj celoj, se ni iam sukcesos montri al la mondo, per bonega granda filmo, ke esperanto brile taŭgas, kiel internacia film-lingvo, se iam la grandaj film-produktistoj mem komencos turni Esperantajn variantojn! Sed por atingi tion ni devas ja iam komenci, baldaŭ komenci! Ni devas komenci modeste kaj kolekti spertojn kaj konstrui brikon post briko.

(x) Ĉe-kurso, gvidata de Audrey Childs-Mee estis filmita antaŭ kelkaj jaroj.

Ĉu la tekniko venkos Esperanton?

Kiam la parolanta filmo el Ameriko invadis Eŭropon, kiam Al Jonson ekkantis sian faman "Sonny Boy", kiam la orkestroj malaperis el la kinoteatroj, ekzistis multaj skeptikuloj, kiuj asertis, ke la parolanta filmo neniam sukcesos pro sia fremdlingveco. La problemo de la lingvo fariĝis tiam treege aktuala. Ĉiuj fakaj filmgazetoj skribis pri tio. La plimulto menciis Esperanton, kiel solvon, sed neniu el la film-potenculoj riskis produkti la unuan pli grandan Esperantlingvan filmon. La publiko, al kiu oni prezentis nekompreneblajn filmojn ofte protestis kaj fariĝis malamika al la



sonfilmo. La situacio en malgrandaj landoj, precipe la slavaj, estas ankoraŭ hodiaŭ katastrofa. Bonajn filmojn oni produktas nuntempe nur en la angla, germana kaj franca lingvoj.

Tiam la Paramount, kiel unua, komencis fabriki, en la laborejoj de Joinville apud Parizo, la diverslingvajn variantojn, dungante teknikojn kaj aktorojn stabojn el la diversaj landoj. La dekoracioj staris, la manuskripto tradukita en dek lingvojn estis la sama; la diverslingvaj trupoj, kun siaj reĝisoroj, sinsekve eniris la dekoraciojn kaj rapide turnis la koncernen scenon, dum alilingva trupo atendis jam sian vicon. Tia rapida amasa produktado ne sukcesis; la filmoj estis malbonaj, kaj la rezulto estas, ke Paramount en tiu ĉi jaro ne plu produktos variantojn

Tamen la filmistoj de la grandaj film-produktantaj landoj ne volas rezigni pri siaj profitdonaj najbaroj-klientoj, kiuj postulas pli kaj pli sialingvajn filmojn. Per eltranĉado de la dialogaj partoj, kiuj ofte estas la plej gravaj momentoj en la agado de la filmo, aŭ per surkopiado de mizeraj klarigaj tekstoj sur la bildon, la problemoj ne estas solvita. La teknikistoj-sorĉistoj senĉese cerbumas pri la forigo de la lingvaj malfacilaĵoj.

Fondiĝis societo "Topoly" (Tobis-Polyphon) en Berlino, kiu speciale okupas sin pri la sinkronigaj sistemoj. Oni diferencigu du specojn de l'produktprocedo. La unua tuj de komenco antaŭvidas plurajn variantojn.

Ĉe tiu unua filmspeco oni pli kaj pli sekvas jenan praktikon: ke la samaj ĉefaj aktoroj parolas la diverslingvajn tekstojn, kiujn ili lernis parkere (ofte ne sciantes perfekte la lingvojn), kaj ke oni fotografas nur iliajn lipomovojn. Poste en specialaj laborejoj oni sinkronigas tiujn mutajn parolantojn, oni submetas al iliaj lipomovoj la koncernajn vortojn, kiujn nun refoje parolas perfekta reprezentant(in)o de la koncerna lingvo. Tiu ĉi optika muta varianto, poste sinkronigita, estas pli kaj pli uzata dum lasta tempo. Jes, ĝi ofte havas eĉ kuriozan sekvon! Evidentiĝis jam, ke tiu aŭ tiu ĉi aktorino havas voĉon, kiu ne respondas al ŝia eksteraĵo. La malharmonio inter la korpo kaj la voĉo sentiĝas akre. La optika sinkroniga sistemo ebligas krei la novan artefaritan filmhomon, kies vizaĝon oni prenas de unu kaj kies voĉon oni prenas de alia. Estas sendube, ke oni tiamaniere povas plialtigi la artistan efikon kaj ke bela aktorino kun malbela voĉo denove havas ŝancojn por filmi.

Pli malfacila estas kompreneble la dua speco de la produktprocedo: filmo nur unulingva, kiun oni volas, pro ĝia granda sukceso, poste transponi en aliajn lingvojn. Sed ankaŭ tie ĉi la rezultoj ĝisnunaj estas jam surprize bonaj. La sistemo de kalkulado de silaboj, de pli- aŭ malpli-longigo de la movo dum la kopiado kaj la el tio rezultanta ŝanĝo de la lipmovoj, la adaptado de la tekstoj poste redaktitaj laŭ precizega kalkulo, ĉio montras en lasta tempo grandan evoluon kaj progreson. Ĉu estas mirige, ke la teknikistoj solvante pli kaj pli praktike la problemon de la multlingveco, komencas forgesi pri Esperanto? Ĉu en tiu

ĉi kazo la tekniko fakte ne venkas Esperanton? Se iam ajn frapis la okulojn kaj la cerbojn la neceseco de internacia lingvo - tio estas sur la kampo de la sonanta kaj parolanta filmo.. Jen prezentigaĵo por Esperanto ŝanco, kiu ne revenos duan fojon tiel baldaŭ. Malgraŭ la forta tendenco redukti la dialogon al minimumo, la vorto restas kaj restos en la filmo.

Kio rezultas el tiu optika sinkroniga sistemo por Esperanto? estas verŝajne, ke la fabrikado de la diverslingvaj variantoj iom post iom malkariĝos. La risko (legu: la kosto) de Esperantlingva varianto malpligrandiĝos, la perspektivoj fariĝos por ni pli bonaj. Ni ne timu, ke la teknikistoj, per tia pure teknika solvo de la lingva problemoj forigos samtempe la necesecon de Esperanto kiel filmlingvo. Ĉio ja troviĝas ankoraŭ en eksperimenta stadio. Eble foje la Esperantaj organizaĵoj mem povos mendi tian Esperantlingvan varianton de granda filmo kaj pagi la plikostojn.

La filmo estas evoluanta daŭre, akceptanta novajn formojn, batalanta konstante kontraŭ ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj baras la vojon al internacia signifo, kiam ĝi havis sendube dum sia muta periodo. Kaj ĉu ne estas nun plej urĝa tempo por ni direkti nian tutan forton, nian plej sisteman propagandon al tiu ĉi nova, ĝis nun apenaŭ tuŝita de ni, kampo de la filmo? Ĉu vere vi kredas, ke la filmpotenculoj venos mem al ni? Neniam! Ĉar ili ja nenion scias pri ni, ili ja ne havas imagon pri la granda disvastiĝo de Esperanto!

Sed kiam ni montrus al ili nian pri-Esperantan propagando-filmon, kiam iliaj okuloj kredantaj blinde nur al la sorĉa ekrano, vidus la Esperantistajn amasojn, niajn kongresojn, la disvastiĝon de Esperanto tra ĉiuj lokoj de la terglobo, tiam povus okazi, ke unu el tiuj potenculoj dirus: "De mia venonta grandfilmo mi riskos turni ankaŭ unu kompletan Esperantlingvan varianton!"



LA KUDRILLO

KAREL ČAPEK

"Kun tribunaloj mi kontaktis nenlun," ekparolis sinjoro Kestelecky, "sed mi diras al vi, ke al mi plaĉas ĝuste la granda akurateco kaj la formalaj kaj ceremonioj, kiujn la juĝistoj kutimas fari, eĉ se temas pri nura bagatelaĵo. El tio ja rezultas certa fido al la justeco. Se la justeco havas pesilon, ĝi do estu pesilo apotekista, kaj se ĝi jam tenas glavon, estu do la glavo akra kiel razilo. Mi rememoras unu okazintaĵon el nia strato.

Iu pordistino, ŝia nomo estas Mašek, aĉetis en butikio bulkojn, kaj maĉante unu bulkon ŝi eksentas pikdoloron en la palato; ŝi do palpas en la buŝo kaj elprenas kudrilon, kiu en la palato enpikiĝis. Nur post momento ŝi ektimis: "Jesu-Kristo, mi povus ja la kudrilon engluti, kaj ĝi trapikus mian stomakon! Jen danĝero kontraŭ mia vivo; tio ne estas ja pardon-ebla! Oni devas esplori, kiu kanajlo enŝide enmetis la kudrilon en la bulkon." Ŝi do iris kaj alportis la kudrilon kaj la ne tutmanĝitan bulkon al la polico.

La polico ekzamenis la butikiston, ekzamenis ankaŭ la bakiston, kiu bakis bulkon, sed kompreneble ambaŭ malagnoskis la kudrilon. Poste la polico transdonis la aferon al tribunalo, ĉar ja temis, komprenu min bone, pri lezo ne grava. La esplorjuĝisto, tipo de konscienca kaj ĝisosta burokrato, denove ekzamenis la butikiston kaj la bakiston; ili ambaŭ jure asertis, ke ĉe ili la kudrilo ne povis eniĝi en la bulkon. La esplorjuĝisto vizitis la butikiston kaj konstatis, ke en sia butikio li ne havas kudrilojn. Poste li iris al la bakisto por vidi, kiel oni bakas bulkojn; li sidis en la bakejo tutan nokton kaj rigardis, kiel oni preparas paston, kiel oni lasas ĝin ŝveli, kiel oni hejtas la fornon kaj piektas bulkojn kaj enforigas ilin, ĝis kiam ili iĝas ore ruĝaj. Tiamaniere li konstatis, ke ĉe la bulkfarado oni efektive ne uzas kudrilojn. Vi eĉ ne kredus, kiel bela laboro estas la bakado de bulkoj, kaj precipe de pano. Mia karmemora avo posedis bakejojn, mi do konas tion. Komprenu min bone; ĉe la

panfarado ekzistas du aŭ tri pli grandaj kaj preskaŭ sanktaj misteroj. La unua mistero estas, kiam oni preparas la fermentaĵon; oni ĝin lasas en la knedujo, kaj tiam okazas sub la fermilo iu sekreta transubstantiĝo; oni devas atendi ĝis kiam el la faruno kaj akvo fariĝis vivanta fermentilo. Poste oni preparas paston kaj knedas ĝin per knedilo; tio do aspektas kiel religia danco aŭ io simila. Tiam oni kovras tion per tuko kaj lasas la paston ŝveli; tio estas la dua mistera transformiĝo, kiam la pasto majeste leviĝas kaj ŝvelas, kaj oni ne rajtas levi la tukon, porŝcivole ekrigardi; mi diras al vi, ke ĝi estas same bela kiel la gravedeco. Mi ĉiam havis impreson, ke la pastujo estas io virina. Kaj la tria mistero estas la bakado mem, tio, kio el la mola kaj pala pasto fariĝas en la forno; Jesuo kaj Maria, se oni poste elprenas tian orkoloran kaj ruĝebrunan panbulon kaj ĝi aromas tiel, ke eĉ malgranda infano ne povos pli ĉarme odori, tio estas ega miraklo; mi opinias, ke oni devus, dum la tri transformiĝoj en bakejo, sonorigi, same kiel oni sonorigas en preĝejo dum levado de hostio.

Sed kion mi volis diri? La esplorjuĝisto do estis embarasita; sed cedi pri la afero li ne volis. Li prenis la kudrilon kaj sendis ĝin al la Ĥemia Instituto, por ke oni konstatu, ĉu la kudrilo estis en la bulko jam antaŭ la bakado, aŭ ĉu nur poste; sciu, ke tiu juĝisto ŝatis sciencajn ekspertizojn. Tiutempe estis en la Ĥemia Instituto iu profesoro, nomata Uher, tre klera sinjoro kun longa barbo. Ricevinte la kudrilon li komence terure inspektis la tribunalojn pro ilia tropostulemo, ĉar antaŭ nelonge oni ankaŭ sendis al li intestaron tiel povutan, ke eĉ la antaŭsekcisto ne povis elteni la fiordon; kaj kiam do komunecon havas la Ĥemia Instituto kun la kudrilaĉo? Sed poste li iom pripensis la aferon, kaj ĝi ekkinteresis lin, komprenu min bone, laŭ scienca vidpunkto. Nu, li diris al si, eble do fakte kudrilo trapasas iajn ŝanĝojn, se ĝi eniĝas en paston aŭ se en pasto oni ĝin bakas; dum la fermentado estiĝas iuj acidoj, aŭ io simila, kaj dum la bakado refoje, kaj la supraĵon de la kudrilo tio povas iomete difekti, alivorte korodi: tion oni povus konstati mikroskope. Sekve, li sin ekokupis pri tio.

(sekvo sur paĝo 11)

LA KVINPINTA VERDA STELO DE ISLAMO

Verda kvinpinta stelo sur ruĝa fono ien la maroka flago, kaj tiu stelo vidiĝas ankaŭ, kiel simbola signo en aliaj islamaj landoj. La kvin pintoj simbolas la kvin "pilierojn de la kredo"; la verda koloro la pacon.

Por la islamanoj, Dio konigis sian volon tra sinsekvo de profetoj. La plej famaj estis Abrahamo, Moseo, Jesuo. Mahometo estis la lasta kaj "la plej granda". La Korano estis revelaciita al Mahometo tra la anĝelo Gabrielo. Ĝi konsistas el pli ol cent ĉapitroj (suratoj). Ĉiu surato entenas iun nombron da paragrafoj, kiujn la plej fervoraj kredantoj parkeras jam tre junaj, helpe de tabuletoj (luaoj).

La ritaj devigoj de la islamano, aŭ "pilieroj de la kredo" nombras kvin, kiuj respondas al la kvin pintoj de la simbola stelo: la "ŝahada", "la salat", "la zahat", la "hajj", la "gawn".


La ŝahada estas la aserto, ke Dio estas ununura. Tiu principo konsistigas la nediskutebla bazo de Islamo. La muezino, kiu vokas la kredantojn al la preĝado, kantas, de la supro de la minareto: "Mi atestas, ke nur Alaho estas Dio kaj ke Mahometo estas la sendito de Alaho".

La salat, rita preĝo, estas individua religia faro, reglamentita de la religia leĝo kaj deviga. Ne necesas preĝi en speciala loko, kiel la moskeo. Simpla tapiŝo aŭ kvadrato desegnita en la sablo sufiĉas. Sed la loko devas esti pura, kiel la kredanto kaj liaj vestaĵoj. Pro tio, en la korto de moskeo staras fontano meze de baseneto. Tie la kredanto, antaŭ ol preĝi, devas trovi purecon. Li lavas siajn manojn, siajn brakojn, sian vizaĝon, siajn piedojn. En la dezerto pura sablo aŭ ŝtono simbolas la akvon.

Dum la preĝo la kredanto "rigardas" direkte al Mekko. Tiu preĝo konsistas el diversaj korpaj sintenoj. Komence, starante la preĝanto diras: "Allah Akbar" (Dio estas granda). Ek de tiam li komunias kun Dio. Poste, kun brakoj pendantaj, li diras la unuajn paragrafojn de la Korano. Li kliniĝas kaj adorkliniĝas kun frunto sur la

grundo, daŭre dirante paragrafojn el la Korano. Kvinfoje en la tago okazas preĝado. Tiu ĉi estas individua faro. Sed, vende, estas rekomendite preĝi en la moskeo kun aliaj kredantoj. En tiu okazo, la gvidanto de la preĝado estas la "imamo" elektita de la komunumo pro ĝia pieco.

La zahat estas leĝa almozo. La Korano rekomendas al la bienposedantoj donaci parton de siaj riĉaĵoj al la malriĉuloj; la konservataj havaĵoj estos tiel purigitaj. La korano diras: "Vi atingos piecon nur kiam vi donacos al la aliaj tion, kion vi ŝatas". Tiu religia "imposto" koncernas ĉiujn havaĵojn: konstruaĵojn, meblojn, kamparajn bienojn, bestarojn, komercaĵojn... La profitantoj estas la malriĉuloj kaj la komunumo, por ĝia prizorgado. Ankaŭ ekzistas la libera almozdono, ĉefe dum la religiaj festoj.



La hajj estas la pilgrimo al Mekko. Tie, ĉiujare je la 12-a monato de la islama jaro (luna jaro), miloj da musulmanoj el la tuta mondo grupiĝas en Mekko, naskiĝurbo de Mahometo. Ĉiuj pilgrimantoj faros la samajn gestojn, diros la samajn preĝojn ĉirkaŭirante la Kaaba, kubforma konstruaĵo, kiu

entenas, je sia orienta angulo, la faman Nigran Ŝtonon alportitan de la anĝelo Gabrielo al Abrahamo kaj lia filo Ismaelo dum ili laboris je la konstruado de templo dediĉita al Dio.

La pilgrimantoj devos esti seksmaturaj, korpe kaj mense sanaj kaj sufiĉe riĉaj por vivteni dum la vojaĝo kaj vivtenigi la familion dum sia foresto. Grave pekas tiuj, kiuj ne pilgrimas al Mekko kvankam ili plenumas tiujn kondiĉojn.

Alvenante proksime al Mekko la pilgrimanto devas konsekritiĝi. Li surmetas "irhamo"-n, specialan vestaĵon nekudritan, faritan el blanka ŝtofo kaj kiu lasas nuda la dekstran ŝultron. Dum la pilgrimado li ne rajtas kovri sian kapon nek tondi siajn harojn, sian barbon, siajn ungojn. Li multfoje, dum la pilgrimo, diros la frazon: "Jen mi, oh mastro, jen mi por vi". Ĉar ĉiuj pilgrimantoj, viroj kaj virinoj, estas vestitaj per sama blanka ŝtofo, ili estas similaj, kiel ili estos antaŭ la dia Justico.

Ili devas aĉeti beston, kiu estos mortigata la tagon de buĉofero. Dum tiu ceremonio, kiu memorigas la momenton, kiam Dio, kortuŝita de la pieco de Abrahamo, anstataŭigis lian filon Isaako per virkapro. Tiu tago estas festata en la tuta islamana mondo. Ĝia nomo estas Aĭd el Kebir (la Granda Festo) kaj ĝi fakte finas la pilgrimon. Poste la pilgriminto rajtas tondi sian hararon. La tuta ceremonio ofte daŭras ĝis kvar semajnoj. Per tiu partopreno la kredanto estos tute purigita je siaj pekoj kaj li rajtos meti, antaŭ aŭ post sia nomo, la titolon "Hajj".

La gawn, aŭ ramadan, fasta monato, signifas por la kredanto la purigadon de la homo, kiu retrovas senpekecon. Dum tiu monato kiam la Parolo venis sur la Teron, la islamano rajtas nek trinki, nek manĝi, nek fumi, nek seksumi. dum la suno brilas en la ĉielo. Eltenemo apartenas al la dogmo, kiel karitato, preĝo kaj pureco. Kiam malaperas la suno la kredantoj kuniĝas por abunda manĝo kaj festado. Je la fino de Ramadan okazas la Aĭd el Seghir (malgranda festo) festita en la familioj, kie la infanoj ricevas donacojn.

Ni vidis, ke la esenca dogmo estas la ununureco de Dio, kreinto de la mondo, ĉiopova, eterna, nekreita, kapabla esti ĉie samtempe. Li de tempo al tempo sendas al elektita popolo profetojn, transdonantojn de Lia Vero. La lasta estis Mahometo. Aliaj konataj profetoj estis Adamo, Noa, Abra-

hamo, Moseo, Jesuo, kies misio estis meti la homojn sur la ĝustan vojon. Ili ricevis tiun mision ne rekte de Dio sed pere de la anĝeloj, kiuj estis kreitaj antaŭ la homoj. Dum sia tuta vivo la homo estas akompanata de du anĝeloj: la bona kaj la malbona. Por la islamanoj la vivo estas nur transira kaj la animoj kaj la korpoj reviviĝos. Tiam Dio petos de ĉiu ĝustigon de lia vivo, kaj li sendos iujn al la Infero, la aliajn al la Paradizo, loko kun ombro de arboj, akvo kaj mirindaj virgulinaj.

(sekvo de paĝo 9)

Antaŭ ĉio li aĉetis kelkcenton da kudriloj, ne sole tute puraj, sed ankaŭ da pli aŭ malpli rustaj, kaj li komencis, en la Hemia instituto, baki bulkojn. Ĉe la unua eksperimento li metis la kudrilojn tuj en fermentilon por konvinkiĝi, kiel ilin influas la fermenta procedo. Ĉe la dua provo li metis ilin en freŝe preparitan paston. Ĉe la tria en paston ŝvelantan. Ĉe la kvara en tute ŝvelintan. Poste li enigis ilin ĝuste antaŭ la bakado. Poste dum la bakiĝo. Plue li enpikis ilin en bulkojn ankoraŭ varmajn; kaj fine en bulkojn jam pretajn. Tiam la tutan serion da eksperimentoj li ankoraŭfoje ripetis por fari kontrolon. resume: dum du semajnoj oni faris en la Hemia instituto nenion alian ol baki kudrilhavajn bulkojn: la profesoro, la docento, kvar asistantoj kaj servisto ĉiutage preparis paston, bakis kaj pretigis bulkojn, kaj poste ili mikroskope esploris kaj komparis la rilatajn kudrilojn. Tiu laboro daŭris ankoraŭ pluan semajnon; sed lastfine oni precize konstatis, ke la koncerna kudrilo estis enpikita en bulkon jam finbakitan, ĉar sub la mikroskopo ĝi detale egalas al eksperimentaj kudriloj enmetitaj en pretajn bulkojn. Laŭ tiu ĉi ekspertizo konkludis la esplorjuĝisto, ke la kudrilo estis enigita en la bulkon aŭ ĉe la butikisto aŭ survoje inter la bakejo kaj la butikisto. Subite la bakisto rememoris, mil diabloj, ĝuste tiutage mi maldungis ja bubon-helpanton, kiu kolportadis bulkojn en korb! Oni do venigis la bubon kaj li konfesis, ke la kudrilon li metis en la bulkon por sin venĝi al la estro.. La bubo ne estis plenaĝa kaj li ricevis nur admonon, sed la majstron oni kondamnis je kondiĉa puno de kvindek kronoj, ĉar li devas garantii pri sia dungitaro. Jen vi vidas ekzemplon, kiel akurata kaj radikala estas la justeco.

LA MEZEPOKA ESPERANTO (KOPAR)

Vere, estas granda neglektemo de mia flanko, ke mi ankoraŭ ne prezentis al vi mian amikon C.E.R. Bumy. Ĉar li estas tre originala homo, kun siaj eternaj problemoj, eterna senkombeco, eternaj tri libroj sub la brako. Kio estas lia profesio? Mistero. Ĉu tion mi ne kuraĝas aserti decide, ke li manĝas, kiel la ordinaraĵoj. Eble el antikvaj kaj mezepokaj poemoj li elsuĉas por si ian ambrozion. Eble pro tia etera nutraĵo li estas tiel diafane malgrasa.

Li estas esperantisto. Mi varbis lin antaŭ longe. Tuj li ekinteresiĝis kaj eksprese li ellernis la lingvon laŭ sia maniero: li lernis la gramatikon, poste la vortaron, poste li ellegis mian bibliotekon. Post ok semajnoj li jam liveris al mi...tute pretan reform-projekton. Mi priiridis lin, klarigis, ke Esperanto estas vivanta lingvo, havas popolon, oni ne plu povas ĝin tondi kaj glui laŭplaĉe. Mi demandis, ĉu li kuraĝus reformi vivantan nacian lingvon, ekzemple la hungaran?

Kial ne? – li respondis.

Kaj ĉu vi sukcesus akceptigi vian reformon?

Eh! Ĉu tio gravas? – li mansvingis, tute malŝate pri mia naŭza realismo.

Tamen, ĝis nun li ne liveris al mi la grandan reformon de la hungara lingvo, kaj enterigis ankaŭ sian Esperantan reformon. Li komencis labori literature. Kompreneble dum tio li inventis kelkajn aferojn. Mi menciis nur la prepozicion "graŭ", kiel "senmaligon" de "malgraŭ", kaj la adjektivon "ica", kiel "senmaligon" de "malica". Liaj lingvaj konsiloj ĉiam estis frapantaj, vere kaprapantaj. Foje oni diskutis pri la tro longaj vortoj: estinteco, estanteco, estonteco. Iu insistis pri la formoj: pasumo, nuntempo, futuro. Alia riskis: itempo, atempo, otempo.

Azenoj vi estas! – interkriis nia C.E.R. Bumy. – Jen la sole ĝusta solvo: timpo, tampo, tempo!

Jen, tia li estas. Ĉiam li havas geniajn ideojn, kaj ĉiam li malprosperas kun ili. Sed tio ne interesas lin. Li ja ne estas "abomena realisto".

Lastatempe li ŝajne elreviĝis pri Esperanto, ne sufiĉe taŭga por naski problemojn.

Mi longe ne vidis lin en la grupo. Hazarde ni renkontiĝis sur la strato.

Nu? – mi demandis riproĉe – Kial vi perdiĝis?

Mi estas tro okupita.

Problemo?

Jes. Sed nun ne literatura. Mi laboras pri teknika problemoj.

Teknika problemoj?

Jes. Sed tio ne interesas vin, vi, verŝajne!

Eĉ, tre interesas min, vi, realisto! Rakontu do!

Nu, mi provas al vi komprenigi la aferon. En la tuta mondo, vi scias, estas granda ekonomia krizo. Kial? Ĉar oni ne povas tiom konsumi, kiom oni produktas. Kial? Ĉar oni produktas per maŝinoj kaj konsumas per homfortoj. Jen la granda malegaleco! Kompreneble homo ne povas konkuri kun maŝino; sekvas troproduktado, laborĉesigo, senlaboreco. Ĉiu homo scias tion, kaj, ho, la azenoj, tamen ne trovis la solvon. Mi devis alveni rekte el la paĝoj de mezepoka fablolibro por solvi la problemon. Kvankam ĝi estas ja ovo de Kolombo. Maŝinon oni devas meti kontraŭ maŝino. Mi jam projektis preskaŭ komplete.

Kion?

Homo! eĉ nun vi ne divenas? La konsum-maŝinon!

Ko... ko... kons...

Kial vi balbutaĉas? Jes, la konsum-maŝinon. Oni simple ekirigos mian maŝinon kaj ĝi konsumos. Ho, kiel ĝi konsumos! La magazenoj malpleniĝos fabel-rapide! Oni ree devos produkti, la fabrikoj ree eklaboros, la senlaboreco ĉesos. Mia maŝino forblovos la krizon! La mondo estas savita!

Mi gratulas! Kara Bumy! Mi gratulas! – mi kriis entuziasme premante lian manon. – Vi estas geniulo! Ĉiam mi sciis tion!

Mi dankas, – li diris memfide. – Nu, kaj kion vi faras? Ĉu vi ankoraŭ esperantas?

Jes. – mi diris tre modeste. – Ekiros ree Literatura Mondo.

Eh! – Li mansvingis malŝate.

Kial eh? Vi ofendas min per ĉi tiu "eh".

Kion fari? Mi devas diri "eh". Kion komenci per lingvo, kiu ne havas arkaikajn formojn. Mi tradukis mezepokan fablon kaj ĝi fariĝis moderna, kvazaŭ gazetartikolo. Al la diablo tiun lingvon, en kiu oni ne povas traduki la "Kuriozajn Historiojn" de Balzac, ne farante el ili enuajn modernajn trivialajn klaĉaĵojn.

Sed, kara Bumy! – mi diris – Esperanto estas juna lingvo! Ankaŭ Dante apenaŭ

estus povinta siatempe uzi arkaikajn formojn. Sed la lingvo evoluas, iom post iom kelkaj ĝiaj elementoj eluziĝos, elmudiĝos, kaj tiam...

Dankon! - li interrompis krude. - Ĉu mi atendu kelkajn centjarojn? Mi ne havas tiom da tempo. Cetere, mi tute ne havas tempon. Adiaŭ!

Haltu! - mi postkriis lin malespere. Li haltis.

Nu?

Kara Búmy! - mi subpremis rideton. - Se tiel mankas al vi arkaika Esperanto, faru ĝin mem.

Ĉu mi? Kiel? - kaj la brilo de problemo ekfajris en liaj okuloj.

Nu, simple. Esperanto estas, ĉu ne, ĉefe latinida lingvo. La arkaikaj formoj de la latinidaj lingvoj propre estas kvazaŭ transiraj formoj inter la nuna lingvo kaj la pura latino. Elcerbumo do tiajn transirajn formojn ankaŭ por Esperanto kaj vi havos kion vi bezonas.

Jen la unua saĝa vorto, kiun mi aŭdas de vi! - li kriis, kaj sensalute eksvingis siajn longajn piedojn. Kun la manoj en la poŝo kaj la kapo profunde klinita, kvazaŭ sub la ŝarĝo de la problemoj, li velis for.

Post kelkaj semajnoj subite malfermiĝas mia ĉambropordo kaj tempeste enflugas C.E.R. Bumy.

Jen, - li diris sen enkonduko kaj ĵetis sur mian skribotablon dikan kajeron. Mi rigardis. "Grammaticu kay vocabularu antiques mundales lingues Sperantu".

Jen! - li ripetis triumfe. - Vi povas ĝin eldoni. Oni povas el ĝi lerni la Esperanton de la mezepoko, la Esperanton de la Rolandkanto, de Vogelweide, de Francisko de Assisi. Vi estis mizere senpovaj, malriĉaj nun vi riĉiĝis. Esperanto estas savita!

Ne koleru, kara Bumy, - mi diris, - sed tio ne estus ĝusta sinsekvo: fari antaŭe arkaikan gramatikon, kaj poste serĉi al ĝi arkaikajn tekstojn. Trovu kelkajn tiajn fosilajn tekstojn kaj poste komentariu ilin per tiu ĉi grandioza verko.

Ho, ĉi tiun pretekston mi antaŭvidis! - li triumfis. - Jen, kion vi volas! Eterna gloro de Hungarlando estas, ke ĉi tie, en la antikva monaĥejo de Utop, mi trovis ĉi tiun pergamenon, devenintan el la fino de la dekkua jarcento. Sur ĝi vi trovos en la mezepoka Esperanto la laŭvortan tekston de la "Primorta Prediko": la unua prilingva dokumento de la hungara lingvo. Legu kaj miru!

Mi legis. Sur flaviĝinta pergameni, kun belaj ruĝaj inicialoj, kun la splitaj gotikaj literoj de la mezepokaj manuskriptoj, tie antikvis la teksto. Pene mi deĉifris:

"Widats wui, confratruy, quio nui estams? Ya pulvu kay cindru estams. En quiomt graceu principe Diu creays nuialn praun Adamum kay donnays ad llui paradisum quiele domum. Kay ell omn fructuy trovibiluy eb paradisu dirays al llui wiwir. Solel interdirays al llui unes arbores fructum. Sed Llui dirays al llui, pro quio llui ne mandduz. Ya, quidie tui manddors ell fructu, tui mortors mortes mortun. Avdays suialn mortun de creatoru Diu, sed oblivays..."

...Amatuy fratruy! Pregiumz por animu isties povres homnes, quiun Sinioru ell falses mundes carceru hodie salvays, quies corpum hodie nui entericams. Que Sinioru lluin locuz cum favoru en sinum de Abrahamu, Iacobu kay Isacu, que en ultimo jugiu Llui rewiwicz lluin por commandir lluin dextre inter lluialy sanctuy kay electituy. Kay anch wuin. Clamate ter: Kyrie eleison!"

Nu? - li demandays (pardonon: de-mandis), kiam mi estis fininta la leĝon;

Mi gratulas! - mi kriis entuziasme. - Tiu ĉi malkovro certe tute konfuzos ĉiujn esperantologojn, kiuj kredis ĝis nun, ke Esperanto estas la verko de Zamenhof. Jen, la embrio de la lingvo ekzistis jam en la mezepoko kaj kaŝe evoluis sur ĝis nun retrovitaj pergameni. Cu vi ne sercos ilin? Ĉu vi ne volas trovi ekzemple la lingvon de la dekkvina jarcento?

Eble mi trovos ĝin, - li diris reve. - Kaj tiam mi eklaboros! Mi tradukos en la trovatan lingvon la tutan Rabelais kaj la tri dekojn da Kuriozaj Rakontoj de Balzac. Ĉu ne, vi eldonos la librojn?

Ne! - mi diris tute decide.




POR VIA DISTRO

Trovotaj vortoj: Jugoslavio - nikotino -
sarkofago - januaro - vendredo - edelvejso
- kristnasko - Japanujo - Mediteraneo -
ripeti - sceptro - privilegio - tulipo -
teretaĝo.

Trovota frazo: " Germanujo estas kreita por
vojaĝi tie, Italujo por restadi tie, Anglujo por
pensadi tie, Francujo por vivi tie."

KRUCVORTA ENIGMO



HORIZONTALE - 1. Malanĝelo - 4. Oftega birdeto - 7. Sangon soifanta batalilo - 8. Montegara landeto - 10. Numeralo - 11. Sovaĝa porko - 12. Supermezura - 14. Kuirvazo - 15. Prepozicio de tempdaŭro - 17. Teksaĵo - 19. Belega floro - 21. Paradema birdo - 22. Frakcio - 24. Granda rabobesto kun nigraj makuloj - 26. Papilieto inter la vestaĵoj - 27. Ruĝa frukto - 28. Reĝaj seĝoj.

VERTIKALE - 2. La plej norda respubliko - 3. Granda dombesto - 4. Para nombro - 6. Okcidenteŭropa riverego - 9. Prepozicio montranta najbarecon - 10. Prezidanto de balkana ŝtato - 13. Skribsigno - 16. Mara birdo - 18. Malmoderna lumigilo - 20. Juvelŝtono - 21. Sudamerika lando - 23. Malkomenco - 25. Montra vorto.

LA VIVO EN GRESILLON

Ĝenerala Kunveno de la 1-7-1995

La kunveno komenciĝas je la 15-a horo. Prezidas Georges Lagrange. D. Babin anoncas, ke la nombro da ĉeestantoj kaj reprezentataj membroj estas 209. La kvorumo estas atingita kaj la asembleo valida.

Post repago de 21 akcioj kaj aĉetado de 52 la nova kapitalo atingas 213400 frankojn. por 927 asocioj. Eksiĝis 7, alvenis 3 novaj membroj.

La financa raporto montras kreskon de la enspezojn pri restadoj dank'al la Sat-Amikara kongreso. La malkresko de la tranoktadoj estigis ĝeneralân malkreskon de ĉiuj aliaj rubrikoj. Kelkaj elspezoj malkreskis: nutraj varoj, salajroj, sociaj impostoj, sed kelkaj konstantaj elspezoj iomete kreskis, ekzemple la prizorgado de la parko, kiu ne dependas de la nombro da ĉeestantoj. Riparo de la tegmento kaj aranĝo de la tolaĵ-ĉambro elspezigis grandan sumon, 35 000 frankojn proksimume. Fine, la financa raporto, kiu aperigas profiton de 20 000 frankoj, estas unuanime akceptita.

Dum la printempa periodo de 1994 16 eksterlandaj infanoj el 5 nacioj kaj 45 francaj entuziasme partoprenis la diversajn aktivaĵojn. Dum la Paskaj Ferioj la SAT-Amikara kongreso grupigis 160 personojn kaj tre kontentige disvolviĝis.

Somere la kutimaj staĝoj akceptis malpli da partoprenantoj ol la antaŭan jaron. 40% el ili estis nefranclingvanoj.. Pro nesufiĉa nombro da aliĝoj, la respondeculoj devis rezigni pri la lasta aŭgusta staĝo. La meza daŭro de la restadoj estas nun de nur unu semajno. La partoprenantoj estas pli kaj pli postulemaj pri komforto La Komitato diskutos pri la sugestoj de la membroj, sed gravaj investoj estus necesaj kaj ne facile amortizeblaj dum nur dumonata kaj duono da malfermo de la Esperanto-Domo

Iu rimarkigas, ke la paneloj, kiuj anoncis la ekziston de la Esperanto-Domo, ĉe la enirvojoj al Baugé malaperis. Pro gravaj laboroj ili estis forprenitaj. Espereble ili reaperos. La agadraporto estas akceptita, krom unu sindeteno.

Gravaj riparoj estos baldaŭ necesaj sur la fasadoj. Nun la sumo metita sur la speciala ŝparkonto ankoraŭ ne sufiĉas. Tiucele plua ŝparado estas necesa. La riparoj estos faritaj laŭ la financaj kapabloj.

La kunven-prezidanto informas pri du proponoj. G. Silfer, ŝatus modifon de la artikolo 10 de la statutoj, post la akcepto de la traktato de Matriĉo, por doni al -francoj la rajton esti komitatanoj. Sialflanke Johano Rapley, ŝatus, ke la nomo de la asocio fariĝu Maison Culturelle des Esperantistes Européens. La Asembleo komisiis la komitaton studi tiujn problemojn.

La kunven-prezidanto deklaras la kunvenon fermita je la 17.40-a horo.

La sekretario: Guy DAIRON

Ĉeestas la kunsidon D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, D. Gourdon, G. G. Lagrange, P. Métivier, J. Vincent. Senkulpigis P. Naulet kaj M. Noulin.

Staĝoj 1995 - Aliĝiloj estis ricevitaĵ samnombro, kiel la antaŭan jaron sed ĉijare daŭre alvenas informpetoj per telefonaj. Sufiĉe bonaj anonciĝas la 4-a kaj la 5-a periodoj. Kelkaj neatenditaj problemoj prezentiĝis. La kuiristo informis nur kvin tagojn antaŭ la malfermo, ke li ne venos. Malfacilaĵoj ankaŭ koncerne la kursgvidantoj de la 3-a studperiodo pro diversaj kialoj (fartu pli bone Marcel!). La du printempaj porinfanaj renkontoj okazis kun po preskaŭ 40 partoprenantoj. La infanoj kaj la gvidantoj estis tre kontentaj. Okazis diversnivelaĵ kursoj kaj kelkaj progresantoj trapasis ekzamenojn.

Staĝoj 1996 - Ili estos same dispartigitaj, kiel en 1995...se ne okazas gravaj ŝanĝoj en la datoj de la someraj ferioj. La infan-renkonto verŝajne okazos de la 20-a ĝis la 27-a de aprilo. Paulette Naulet ricevis informpetojn el Svedio, Ukrainio, Pollando, sed neniu firma aliĝo venis.

Por la somera periodo Henri Boyet interrilatas kun diversaj eblaj kurs-gvidantoj. Herbert Mayer, kiu gvidos kurson en Bouresse, povus veni ankaŭ en Gresillon por prelegi pri literaturo. Ankaŭ Claude Gacon estos kontaktita. Georges Lagrange, nova akademiano, gvidos kurson pri tradukado fine de julio. Bindarto-kurso kaj fotoarto-kurso estos organizitaj.

Disdivido de la laboro - Pierre Métivier konsentas helpi S-inon Cheverry en la preparo kaj sendo de informiloj al la diversaj gazetoj kaj asocioj, esperantaj aŭ ne. Koncerne la prizorgaj laboroj, la malnova pordo de la tolaĵ-ĉambro estos refarita, kaj la interno de la ĉambro refarbita. Diversaj riparoj de plafonoj estos faritaj. M. Noulin informas, ke kelkaj esperantistoj de Choisy-le-Roi sin proponis por veni dum unu semajno por partopreni en riparaj laboroj; dato devos esti fiksata.

Diversaĵoj - La proponoj de G. Silfer kaj de J. Rapley estos pridiskutataj dum la kunveno de oktobro. Intertempe la membroj studos la problemon. Dum la UEA kongreso en Tempere okazos kunveno de reprezentantoj de Kulturaj Esperantaj Centroj por interŝanĝo spertojn. S-ino Vincent kaj/aŭ S-ro Métivier ĉeestos tiun kunvenon kiel reprezentantoj de Gresillon. S-ino Gibeze sendis al Gresillon la tutan kolekton de infandesegnaĵoj el la tuta mondkuglo ĉi ricevis dum pluraj jaroj. Paulette Naulet proponas zorgi mem pri eventualaj ekspozicioj aŭ vendado de tiuj desegnaĵoj.

La sekretario: Guy DAIRON

NIA LIBRO-SERVO

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroliĝi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr.fr.

GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr.fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono reviziita -
Prezo: 30 fr.fr.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Artaj donitaĵoj :



Se vi povus longigi tiun pentraĵon je 20 centimetroj, forigi tiun hororan rozkoloron kaj egaligi tiujn timigajn ondojn, ĝi iĝus agrabla ornamajo por nia nova salono.

Grandtalentulo :

Ne lasi sin enfali en malesperon :



Trankviliĝu mia karulo ! Mi tute ne enuas ; mi havas bonajn amikojn. Hieraŭ, via advokato kondukis min al la diskoteko, kie ni dancis preskaŭ ĝis tagiĝo. Kaj mi havas por morgaŭ inviton de la juĝisto por la Surpriza Festo de la juristoj.



Jen la skizo de nia nova urbodomo. Dank'al tiu ĉefverko, nia tre amata konfistito, S-ro Duril, iĝis la unuapremiulo

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalo : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34